

KOLEKTO DE LA REVUO “*L' ESPERANTO* „
sub patronado de la ITALA KATEDRO DE ESPERANTO

JOSEFO GIACOSA

ŜAKLUDADO

(*Itale: Una partita a scacchi*)

Esperantigis verse Fratoj P. kaj R. Padulli



A. PAOLET, eldonisto
S. Vito al Tagliamento (Italujo)

1921

KOLEKTO DE LA REVUO “ *L' ESPERANTO* „
sub patronado de la ITALA KATEDRO DE ESPERANTO

JOSEFO GIACOSA

—

ŜAKLUDADO

(Itale: Una partita a scacchi)

Esperantigis verse Fratoj P. kaj R. Padulli



A. PAOLET, eldonisto
S. Vito al Tagliamento (Italujo)

1921

ĈIUJ RAJTOJ REZERVITAJ.

AL GENIA ESPERANTISTA AMIKO
DOKT. P. C. MONTI
NIA UNUA PROFESORO DE ESPERANTO
NI DEDIĈAS.

LA TRADUKINTOJ

Milano, 1912.

PROLOGO

1.

Mi prenis argumenton por la dramo versita
El romanc' en jarcento dekkvara jam verkita.
Je vero, sub ĉi tiu daton oni ne trovas;
Tamen, en la jarcento, vi daton pensi povas....

.
.

La romanco provence estis tute skribata,
Per stilo unutona, egala, kadencata,
Kiu la nervojn tedas, kiel sonorilego
Senĉese sonoranta; sed — stranga kontrastego! —
En egaleco ĝia estis propramoveco,
Kiu min igis trovi ĝin plena da ĉarmeco....
Necesas parentezo: — Mi ne volas, leganto,
Ke vi ekopiniu, ke mi estas falsanto,
Kiu por ke de l' verko pligrandiĝu l' efekto,
Kulpigas aliulon pri la ĉia difekto.
Ĉar, kvankam de ĉi tiu art' la poeziistoj
Povas esti tre prave nomataj instruistoj

Kaj kvankam uzis tiun ĉi arton mem Manzoni,
 En la granda romano, kiun vi devas koni,
 Kaj kvankam mi mem uzus l'arton de l' aliigo,
 Se de l' verko ĉi tio taŭgus por plifamigo,
 Tamen nun mi vin petas, mi vin petas sincere,
 Ke vi kredu, ke nune mi parolis laŭvere.

2.

Estis tag' de Aŭtuno, la plej stranga sezono,
 En kiu mizeriĝas penso, volo, rezono.
 Vere, aŭ pro l'odoro vina de l' atmosfero
 Aŭ pro l' herbeja fumo spirita ĉe vespero
 Aŭ eĉ pro antaŭsento pri la Morto rabanta,
 La pensoj en Aŭtuno tute tre malĝojiĝas,
 Dun Naturo ĉirkaŭa pli kaj pli malfortiĝas.
 Mi sidiĝis tutsole: — ho!?! mi diris: *sidiĝis!*
 Mi ĝustigas: seĝegen mi tutkorpe sterniĝis
 Kaj, je duonfermitaj okuloj, per la manoj
 Duonfermitan libron tenis; — de l' vilaĝanoj
 Dume mi la kantetojn, la bruojn aŭskultadis.
 Noktiĝis: el fenestro fermetita blovadis
 Venteto, kiu kvazaŭ diris: — Jen vintro venas! —
 Mi ne min movis, kvankam mi venton abomenas:
 Aŭ pro stranga kaprico aŭ pro volo restema,
 Mi, malvarmon sentante, kuŝadis senmovema:
 En mallumo, grandega ekŝajnis la ĉambreto....

Saltetante, flugadis zumetanta muŝeto:
Ĝi fine sur la vitrojn ekfrapis al si kapon....
La vento bruetigis de l' fenestro la drapon....

3.

Mi tiujn malgravaĵojn, sinjoroj, rakontadas,
Ĉar ofte ne poeto, sed la aĵoj versadas:
Aŭ versadas la vento la branĉojn tremiganta
Aŭ antikva kanteto en kapon revenanta
Aŭ ombro, aŭ, tre ofte, de cigaro la fumo
Aŭ de virina silka vesto la plaĉa zumo
Aŭ la pluvego, kiu en la korteto muĝas,
Aŭ seĝego velura, en kiu ni rifuĝas,
Aŭ eĉ suna radio la vitrojn frapadanta....
Per unu vorto, ofte la Naturo ĉarmanta
Mem versadas kun tia tre sankta harmonio,
Per kiu ridis, ploris Arjosto, Ĝeremio....
Nu! Mi sterniĝis tute kaj okulojn fermetis,
Mil aferojn pensante.... La vento muĝadetis....
Mi ellasis la libron por ekdormi: Aŭtuno
Estis (mi ĝin jam diris) kaj tutsubiris suno....

4.

Estis en libro fabloj antikvaj kaj infanaj
Pri paĝioj, feinoj kaj mastroj kastelanaĵ:

Ĝi estis kelkafoje diboĉeta, simile
Al avo ridetanta ruzece kaj trankvile.
Tre strange! Sed ĉu tiuj ĉi paĝoj polvoplenaj
Estas la amo simpla, la personoj senĝenaj.
Oni kredus, ke tiam estis ĉiam printempo,
Ke ĉe tiuj personoj malrapidis la tempo.
Kvankam la kastelmuroj renversiĝis je tero,
Kvankam sur ili rampas trunketoj de hedero,
Kvankam falis la dentoj de la rompitaĵoj turoj,
Kvankam ne havas freskojn plu la salonaj muroj,
Kvankam supre de ĉiu fortikaĵa kameno
Estas sovaĝbirdoj kaj da rubaĵoj pleno,
Tamen restas, pli firmaj, pli kolosaj ol turoj,
Pli grandegaj, pli tutaj, pli fortikaj ol muroj,
La vizaĝoj de l' homoj, kiuj vivadis tiam:
Ilin ni konos vere, ilin ni konos ĉiam.
Jen la viroj belegaj kaj tute senmolecaj,
Majestaj, fortaj, bravaj, kuraĝegaj, vivecaj,
Kun la glavoj sur flankoj, kun la fakoj sur manoj!
Jen bravaj batalantoj, jen pacaj kastelanoj....
Ne konante patrujon, liberon ne konante,
Ili mortis pro kiso junulina ĝojante.
Estis al ili kune tri nomoj en la koro:
Amatin', Reĝo, Dio; kaj, sur tiuj, honoro:
Jes, sur tiuj honoro: la honoro, la leĝo
Ol la suno pli luma, pli blanka ol la neĝo.
Tiam, tra l' entreprenoj de vivo grandanima,
La amo familia estis daŭra, senlima;

Tiam la maljunulo, la patro, eĉ la reĝo
Vespere gehejmanojn benis: kaj pli ol preĝo
Valoris ago tia farita tra silenco;
Tiam la maljunulo mortis kun la kontento,
Scii, ke ĉe la sia estos la tombo fila,
Ke la filo de l' filo, infano tutĝentila,
Eniĝos (tre malfrue) en la tombon de l' avo.
Ŝajnis, ke la mortanto diris en paca ravo:
» Ne ploru, ne priplendu, ĉar ni kuniĝos foje ».
Kaj ŝajnis, ke li dume rigardis ride, ĝoje....
Kiaj fabeloj tiam en la vintraj vesperoj,
Dum fore falis molaj, silentaj la neĝeroj!
Oni tre rakontadis pri knabinoj havantaj
Orajn harojn; pri drakoj; pri fantomoj paŝantaj;
Kaj la larmoj de tiuj fabeloj eltiritaj
Falis suben de l' fortaj vizaĝoj brunigitaj....

5.

Rakontoj pri bataloj, pri amoj, pri moroj,
Ho tre dolĉaj ripozoj post maldolĉaj laboroj,
Ho kortoj, kiujn kovras la kardo kaj l' urtiko,
Ho librapogejoj skulptitaj en gotiko,
Ho vitroj de fenestroj milkolore pentritaj,
Ho filinoj flekseblaj de patroj pezvestitaj,
Ho skarpoj brodaditaj, dum atendoj sopiraj,
Ho kantetoj preĝejaj, ho preludadoj liraj,
Ho de la monaĥejoj tre silentaj ĉambretoj,

Loĝitaj de revantoj, sanktuloj kaj poetoj,
Vi, vi estas de l' arto la fajrejoj tre varmaj,
Vi, nun ankoraŭ vivaj, vi, nun ankoraŭ ĉarmaj!
Kvankam la tempo ĉion detruis persekute,
Tamen ĝi malfortigis vin, ne detruis tute!
Sed, baldaŭ aŭ malbaldaŭ, ĝi vin nuligos fine,
Ĉar ĝi sur aĵojn homajn frapas, obstine....

6.

Iom post iom tute ĉirkaŭe noktiĝadis:
Mi venkis malmovemon. El la lampo pluvadis
Maldisa lumo super la paĝoj neskribitaj,
Atendantaj rezulton je horoj pasigitaj:
El romanc' en jarcento dekkvara jam verkita
Mi prenis argumenton por la dramo versita.



PERSONOJ

RENATO

JOLANDO, lia filino

OLIVERO, grafo de Fombrono

FERNANDO, paĝio

SERVISTO

RENATO kaj lia filino JOLANDO staras ĉe l' fenestro, rigardante kiel estas la vetero.

La fenestro enlasas dubegrizan lumon, kiun venkas la ruĝa lumo de l' fajrhava kameno.

Servistoj alportas du lumilojn je oleo kaj metas ilin sur tablon.

UNUA SCENO

RENATO kaj JOLANDO

JOLANDO

Kaj la pluvo senĉesa, tre malvarma faladas....

RENATO

Neĝos morgaŭ: mi sentas, ke la neĝo venadas....
En tiu ĉi mateno la monto je neĝeroj
Estas kovrata.

JOLANDO

Patro, turniĝadas l' aeroj!

RENATO

Kioma horo estas?

JOLANDO

La dekseza.

RENATO

Nun vere

Rapide mallumiĝas: estos baldaŭ vespere!
 Ho! La sorto malbona estas al vi, filino....
 De maljunulo estas vi, jen, la kaptitino.
 En valo mallumega kuŝas via beleco!
 Atentu! Kiel muĝas la venlo je tristeco!
 Vane la monton altan obstine ĝi skurgâdas:
 La monto, ĝin venkante, tre plorinde ĝemadas:
 La rompaĉitaj branĉoj tutplenigas l'arbaron.

JOLANDO

L'arbaristo komencos de l' branĉfaskoj la faron.
 Jam en kameno, morgaŭ, niaj arbegoj koraj
 Bruliĝos malrapide tra flamoj multkoloraj:
 Vere tre bonaj, koraj estas la belaj arboj,
 Kiuj sindonas pace por ke fariĝu karboj!
 Dum mi rigardas ilin knarantaj en kameno,
 De maten' al vespero, de vesper' al mateno,
 Min tre kompatemigas ilia dolĉa knaro,
 Mi pensas pri la vivo pasinta en l'arbaro....
 Ili, la kapon tie levante malhumilaj,
 Pluvon, neĝon toleris, je gigantoj similaj,
Kaj nun ankoraŭ neĝos....

RENATO

Mia filino ĉarma,
La ĉambro nun senŝerce fariĝis tro malvarma.

JOLANDO

Venu, patro, ĉe l' fajron, por ke vi vin varmigu,
Dume viajn junaĵojn al mi remorigu.
Aŭ rakontu la fablon pri Haroldo, la reĝo....
Estas bele babili dum faladas la neĝo....
Mi vokas por vin aŭdi la serviston Martenon....

RENATO (*sidiĝinte ĉe l' kameno*)

Ne, mi volas vin nure! Venu ĉe l' kamenon.
Alpaŝu: la parolo pli preta, se najbara,
Atingos koron vian, mia filino kara....
Mi vin sole posedas, filino, sur la tero.
Vi por mi estas ĉio: kredo, ĝojo, espero.
Mi, rigardante vian bonan, ĉarman vizaĝon,
Forgesas malsanecon kaj la maljunan aĝon.
Fraton bravan, filino, al vi mi deziradis,
Sed Dio miajn varmajn preĝojn ne plenumadis.
Li bonagis: du filojn mi ami ne, ne povas.
Por vi en koro mia amon mi nure trovas.
Se frat', post vi veninte, estus en la kastelo,
Li ŝtelus eble amon mian por vi, anĝelo....
Vi, post la patromorto, havos mil feŭdajn kronojn
Kaj plimultajn vasalojn kaj multe pliajn monojn....

JOLANDO

Paĉjo, mi jam komprenis: nun vane vi parolas....
Al vi mi diros kion vi, patro, diri volas....

RENATO

Nu!

JOLANDO

Vi volas, ke baldaŭ la filin' edziniĝu....

RENATO

Jes, vere: mi ne volas, ke vi senedziniĝu.
Do, kavaliro bona, nobela, ĉarma, riĉa
Vin certe kontentigus: kaj mi estus feliĉa!
Al morto mi alpaŝas.

JOLANDO

Tro malbonaj paroloj!
Vin certe rejunigos printempo kaj violoj.

RENATO

Oni aŭdas ĉi tie nur muĝadon de l' vento:
Cetere, sur kastelo regas ĉiam silento!
La tegmentoj maljunaj tre bezonas la kantojn,
L' arkadoj tre bezonas malgrandajn krietantojn.
Mi bezonas infanon porti sur miaj manoj,
Mi bezonas, ke « avo » min nomadu infanoj!
Oni patriĝas nure por atingi l' avecon
Kaj, aviginte, oni amegas infanecon.

Mi vivas nur vivadon tro paca, tro facila:
Infanoj igu mian dormadon maltrankvila!
Ankaŭ nur por riproĉi infanojn mi bezonas.

JOLANDO

Ne.... Mi vin sole amos.

RENATO

Pro kio? Mi vin konas,
Konante viajn filojn: ilin amante, pere,
Mi amas vin, filino, mi amas vin sincere.
Vi, severa, prudenta, pripensema fariĝas,
Vi fariĝas tro granda, vi jam nun fraŭliniĝas,
Ne estas plu infana animo pura via;
Por mi sole ne estas ĉiu korbato via....
Vi fine viriniĝas: kaj brakon prezentante,
Al vi mi reverencas, repaladaniĝante....
Vi ne konas de l' montoj la belegajn vidaĵojn,
Vi konas nek vilaĝojn nek urbojn nek altaĵojn,
Dum la mondon plenigas amuzaĵoj kaj floroj:
Tie ĉi nur pasadas longaj, malĝojaj horoj.
Ĉirkaŭata de montoj, vi baldaŭ maljuniĝos,
Se am' en koro via, filino, ne naskiĝos!
Mi mortos. Ho, pensu pri estonto, filino!

JOLANDO (*ridete*)

Mi en la monaĥejo estos monaĥestrino.

RENATO

Vi ridas....

JOLANDO

Nu, mi diros al vi, patro, ke io
 Ekokupas min, kiam mi parolas kun Dio.
 Mi revas kelkafoje, ke, post longa vojaĝo,
 Al mi junulo venas, bela je la vizaĝo,
 Kiu min ekelŝtelas for de ĉi tiu loko,
 Min vokante per bela, ĉarma, sonora voko....
 Sed ekelreviĝante, la ĉambroj de l' kastelo
 Ne sonoras per paŝoj militaj de l' anĝelo!....

RENATO

La markizo D'Andrato je vi edziĝi volis:
 Vi diris: ne!

JOLANDO

Sed, patro, kun li mi ne parolis,
 Lin neniam mi vidis nek konis mia koro.

RENATO

La duko De Rosalbo....

JOLANDO

Nu, vere je l' honoro,
 Eble li estas brava, sed ne havas ĉarmecon!

RENATO

Sed la grandanimeco superas la belecon!

JOLANDO

Mi ne vidas animon, 'mi la vizaĝon vidas:
Edziniĝi sen amo mi certe ne rapidas!
Homo estas ŝatata ĉu sklavo, ĉu sinjoro,
Antaŭe je l' vizaĝo, pli malfrue je l' koro.

RENATO

Ĉu vi volas vivadi ĉiam ĉe maljunulo,
Kun brodilo, ŝpinilo, kudrilo, ŝaktabulo?

JOLANDO

Ho! Vi nune memorigas de l' ŝakoj la ludadon:
Al vi, tre kara paĉjo, mi ŝaldas revenkadon.

RENATO

Permesu, ke mi venu de la dirad' al fino.
Mi ne estas ŝakisto plu, ĉar la lernantino
Superis instruiston: vi kiel fortikaĵo
De Bard estas: ĝin venki estas maleblegaĵo.
Bonŝakisteco via, ho! estas por mi gloro.
Do.... la duk' de Rosalbo....

JOLANDO

Se ĝustas la memoro,
De vi mi jam ricevis je koro liberecon....

RENATO

Mi ne kredis vin tiel amanta fraŭlinecon!

La viro vin volanta (mi estas vere certa)
 Havos nomon honoran, estos bela kaj lerta.
 Ne estas la prefero al vi malpermesita:
 Vi kiun vi deziras estas elekti kvita....
 Ĉu vi amas sekrete?

JOLANDO

Ne.

RENATO

Vi diris veraĵon.

Ĉar, male, vangoj montras de l' amo la ruĝaĵon.

JOLANDO

Mi ne plu volas vian bonegecon pruvadi:
 Al vi tute konsentas edzon al mi serĉadi.
 Al vi mi donas mian liberecon je koro
 Nur kondiĉe, ke....

RENATO

Dankojn!

JOLANDO

*(oni aŭdas laŭtan sonoron de proksima trumpeto;
 ŝi iras al fenestro).*

La trumpeta sonoro!

RENATO

Al mi por oferdoni, de malproksimaj valoj,

Vasalo nun alvenas....

JOLANDO (*rigardas ekstere*)

kun multe da ĉevaloj.

DU A SCENO

(*Eniras Servisto kaj poste OLIVERO, grafo de Fombrono, kaj FERNANDO*).

SERVISTO

La grafo de Fombrono petas je la favoro
Veni por vin viziti, afablega sinjoro.

RENATO (*fervore*)

La grafa moŝto? Ĉiuj al li faru honoron!
Mi de l' hejmo lin volas ne gaston, sed sinjoron!

La Servisto eliras; grafo OLIVERO eniras kune kun FERNANDO).

RENATO (*al Olivero*)

Amiko nobla, kore mi benegas vian venon:
Hodiaŭ la kastelo havas da ĝojo plenon!

(li prezentas Jolandon)

Estas filino mia.

OLIVERO

Ho! kia kontrasteco!

Dum teda neĝfalado de l' rozoj la beleco.

RENATO *(al Jolando montrante Oliveron)*

Vi konas nomon lian: kunmilitantaj restis
Ni, kiam fortaj brakoj al ni ambaŭaj estis.
Ni, kune batalante, kune trovis danĝerojn,
Kune venkis la riĉan sinjoron Montoferojn!

OLIVERO *(montrante Fernandon)*

Fernando, la paĝio.

RENATO

(bonvole kaj atente rigardas la paĝion kaj respondas per kapsignoj je lia profunda riverenco; al Olivero)

En li, de via skolo,
Estos taŭga la mano, prudenta la parolo.
Malvarmo turmentegas vin kaj vian skolanon!
Sidiĝu ĉe la fajro.

(al la servistoj)

Enverŝu Momeljanon!

OLIVERO (*sidiĝas ĉe l' kameno*)

Jolando estas bela (estas dirinda vero)....

RENATO

Silentu! Ĉu bonfartas vi, kara Olivero?

OLIVERO

Jam pasis la beltempo!

RENATO

Sed vi fortika restas.
Ĉu vi de la malvarmo turmentita ne estas?
Vi, por veni ĉi tien, iris tre longan vojon!

OLIVERO

Okazis ŝtelatako al mi ĉi tiun fojon,
Ĉe la valego.

RENATO

Kiel?

OLIVERO

Se mi trairis landon
Senvunde, mi dankegi devas tute Fernandon.
Ni kaj niaj servistoj rajdis sur kvar ĉevaloj,
Kiam venis fajfinte el la arbaraj valoj
Dek bandanoj: la estro, al mi proksimiĝante
Ordonis, ke lin sekvu, maldolĉe parolante.
Proksimiĝis Fernando: « Eble ni nin submetas,

Sed la vojon, sinjoro, por vin sekvi, ni petas ».

Dirinte, la bandestron unufrape mortigis.

Sed ceteraj bandanoj nin tuje ĉirkaŭigis:

Ili nin frapmortigi havis intencon certe:

Naŭ ili estis, junaj kaj batalantaj lerte;

Ni kvar, krom mi maljuna: venk' estis malfacila.

Sed tuj al mi Fernando proksimiĝas, simila

Al kiu sekretaĵon prenas, kaj, la ĉevalon

Spronfrapante, rapide li trairis la valon.

Kvin bandanoj lin sekvas, tutplenaj je fervoro,

Kredante, ke li kuras kun tre granda trezoro:

Kaj senglora pro tio al mi la venko restis,

Sed certa kaj facila.

JOLANDO

Ĉu atingata estis?...

OLIVERO

Fernando? Jes: bandanojn malproksimen tirinte,

Li turnis sin kolere al ili, ridetinte.

Je kentaŭro simila, li, rajdante vivege,

Atakis la krimulojn sinĵete kaj kriegera.

En defendo tre lerta, en frapo terurega,

Tutan straton okupis per sia glavo ega.

Sed la glavo rompiĝis, senĉese batalinte!

Tujege ni (kvar niajn malamikojn venkinte)

Al li kuris: bandanoj, plenaj je malespero,

Ekforkuris lasante tri mortulojn je tero.

JOLANDO

Ĉu vi estas vundita?

OLIVERO

Mi ne: estas vundita
Fernando, sed mi kredas, ke li estas jam kvita.

FERNANDO

Jes, grafo.

RENATO

Al vi manojn mi premegas, paĝio:
Vi estas kuraĝega kaj saĝa pli ol dio.
La patro tutfeliĉe kisos vin revenantan.

FERNANDO

Mi patron plu ne havas....

RENATO

Ha! Vi havas amantan

Patrinon....

FERNANDO

Ne, mi ilin konis, Sinjor', neniam:
Al mi la sorto estis ĉiam malbona, ĉiam!
Ha! Mia blazonŝildo havos ja nigran strion!
Mi pri vivo longega ĉiam preĝadas Dion
Kaj mi volas, ke gloraj estu miaj idaroj!
Mi ŝajnas ambicia, sed ĉiuj miaj faroj
Mi ne ŝuldas al homoj, sed al mi mem, Sinjoro....

RENATO

Virto kun modesteco estas ja pli glorinda.

FERNANDO

Sed ankaŭ fanfaronado estas, moŝto, laŭdinda,
Se nur fanfaronemo ne superas virtaĵojn.

RENATO (*fiere*)

Mi amas la faraĵojn, ne la fanfaroniĵojn!
Vi diradas malhontajn, malhumilajn parolojn.....

FERNANDO

Malhumileco decas al mi, ĉar miajn volojn
Mi sole plenumadas, plenumis, plenumados,
Kiel mi jam nun diris, kiel mi ja dirados!

RENATO

Ne priplendu, Fombrono, se mi lin tre riproĉas,
Sed lia glorameco je vero ekdiboĉas!

FERNANDO

Mi vin tutopinias kuraĝa, saĝa homo,
Mi respektas bravecon vian kaj vian nomon.
Sed humiliĝon, moŝto, mi ne havas en koro:
Malhumileco estas, laŭ mi, virto, sinjoro.

RENATO (*serioze*)

Vi kion de la vivo konas, ĉarma junulo?
Ĉu, ĉar al vi multege lumas, lumas okulo,

Ĉar estas al vi bela, ruĝa, freŝa la vango,
Ĉar kuras tra la vejnoj rapide via sango,
Ĉar vi sentas la koron tutplena da plezuro,
Ĉar al vi ŝajnas ĝoja, brilanta la naturo,
Ĉar, rigardante brave la sorton alpaŝantan,
Vi havas brakon fortan kaj koron esperantan,
Ĉar estas nokto via tute plena da steloj,
Ĉar plenumiĝas ĉiam viaj malordaj celoj,
Vi ordonas estonton? Kaj per tuta l'animo
Vi krias al la sorto: « Nu! Mi volas sen timo! »?
Ĉu vi ne tute scias, ĉu vi ne tute konas,
Ke, dumvive, la tempo al ni ĉiam ordonas?
Ke, por atingi unu celon avidegitan,
Vi vidos vin lacegan kaj de sango kovritan?...
Mi ankaŭ estis iam tutplena da espero,
Da forto, da kuraĝo, da amo je l' danĝero;
Al mi ankaŭ la bruston plenigis grandaj miroj,
Min ankaŭ tutplenigis la batalaj deziroj;
Se standardoj svingadis de batalad' en pleno,
Mi glavon elingigis, en mia vivmateno;
Eklumis tuj okuloj kaj batis mia koro
Je la nomo de venko, de batalo, de gloro....
Sed ŝajnis al mi poste tro peza glavo mia,
Forflugis ĉia forto, forflugis volo ĉia.
Silentiĝis la batoj batalaj de la koro:
Ne plenumitaj kuŝis miaj songoj de gloro!

FERNANDO (*komence entuziasme, poste malĝoje*)
 Ho maljunulo! havas vi tiom da nobleco,
 Da vizaĝomajesto kaj da grandanimeco,
 Kiom havis la homoj en la mondo neniam.
 Vi parolas tre saĝe, vi profete parolas,
 Mi viajn saĝajn normojn parkere lerni volas:
 Sed ne similas, tamen, mia sort' je la via.
 Al vi estis gepatroj kaj domo familia;
 Vi estis edukata de la patraj paroloj,
 Estis direktadataj de patro viaj voloĵ.
 Al vi de viaj avoj jam estis transdonata
 Nomo glora, kaj devas ĝi esti defendata.
 Al vi, nobla sinjoro, al vi la bataliloj,
 Antaŭe ol' armiloj, ja estis nur ludiloj.
 Mi ne! La orfo estas ja neniam infana.
 En la aĝo sencela, ĉarma, rida kaj vana
 Mi nur konis ploraĵojn, mi nur konis kolerojn,
 Mi nur konis kontrastojn, timegojn kaj danĝerojn!
 Mi de l' prapatroj nomon honoran ne ricevis,
 Mi ĝin puran konservi aŭ famigi ne devis,
 Ne laŭdis min patrino, se mi montris kuraĝon;
 Se mi venkis, ne kisis min patro sur vizagon.
 Min, post ke mi montriĝis en batalad' bravulo,
 Ne ricevis la hejmo, sed domo de fremdulo!
 Al mi oni ne metis virton, kredon en koro;
 Al mi mema mi ŝuldas virton, kredon, honoron.

(*fervore*)

Mi ĉiujn bataladojn miajn ne plu memoras.

Ĉiuj la junulinoj min amas, min adoras!
Mi, brave memfidante, neniam enviadis,
Kiam la riĉegaĵojn aliulajn vidadis.
La kontraŭaĵojn ĉiam batalanta, venkanta,
Mi je soleco mia estis tute ĝojanta....
Sed nun, post ke la vojo de la viv' ebeniĝis
Kaj je kavaliriĝo la tempo proksimiĝis,
Nun, kian al mi estos la plej granda trezoro:
Meti la sproniletojn kavalirajn el oro,
Ĉu vi volas, ke restu mi tute senparola?
Ne! Trolonge mi restis muta, trolonge sola!
Tre fortika mi estas! Kaj ĉiuj malesperas
Kun mi glavbatalante: neniu min superas!
En sagpafo superas mi ĉiujn la junulojn:
Altrafas sago mia plej etajn celtabulojn.
Se mi metis al falko ĉapeleton, je vero,
Sendube kun kaptaĵo ĝi venas al la tero.
Kaj ne eĉ la belartojn mi forgesis lernadi:
Mi povas la liuton ĉarme sonorigadi.
Per mia kanto ĉie mi meritas la laŭdojn;
Pri l' amo fabelante altiras mi la plaŭdojn.
Mi rompis multajn lancojn en turniro kurante,
Mi ricevis rigardojn nobelinajn, venkante...

RENATO (*kolere*)

Mi ne povas toleri troan malhumilecon!
Nu! Nu! Se mi pruvigi volus vian taŭgecon,
Vi sendube...

FERNANDO

Sendube al vi mi tutpruvadus.
Kion mi povas fari: ĉiujn mi konvinkadus!
Ĉar la koro ne timas, pretiĝas miaj brakoj
Je batalo de glavo...

(li ekvidas ŝaktabulon)

je batalo de ŝakoj!

RENATO

Laŭ diritaĵo via mi vin ekzamenados;
Je batalo de ŝakoj vian lerton pruvados!

(al Jolando)

Al li, filino, pruvu — kaj estos multa gloro —
Ke oni povas venki kun humilec' en koro.

(al Fernando)

Viaj kaŝitaj povoj estos nun konstatitaj:
Vi malvenkos!...

FERNANDO

Ho! tion ni vidos: ĉu pensitaj
Estas la ludkondiĉoj?

RENATO *(solene)*

Jes: se vi venkantigōs,
Vi je filino mia Jolando tuj edziĝos.

FERNANDO

Kaj se min en la ludo ne favoros la sorto,
Kiaj kondiĉoj estos?

RENATO (*altirinte lin, tre mallaŭte*)

La morto.... Jes! La morto!

FERNANDO

Estas malofte tiaj bonŝancoj sur la tero.

RENATO (*iom pente*)

Ĉu vi volas?

FERNANDO

Jes! estas por mi bona l' afero!

RENATO

Se vi malvenkos, poste ke vi estos ludinta....?

FERNANDO (*ridante*)

Ho! Ho! Se mi malvenkos, mi ne estos venkinta!

(*serioze*)

Kaj mi ja nek malbenos nek plendados, sinjoro.
Se mi vivis malinde, mi mortos kun honoro.

RENATO

Al vi, Jolando!

FERNANDO

Iom mi estas malrespekta:
Sed de la belaj ŝakoj la ludado korekta
Devas esti farata dum soleco silenta,
Por ke ludanto estu laŭ eble plej atenta.
Iru ĉe Oliveron, la grafon de Fombrono:

Vi parolados kune pri l'junula sezono.
Ni tiel ludos solaj.

(La tableto, je kiu sidiĝas la geludantoj, staras kiel eble plej antaŭe; male la kameno estas malantaŭe, en angulo. Olivero sidas ĉe la kameno: Renato proksimiĝas al li).

OLIVERO

Fernando brava estas.

RENATO

Reenverŝu, karulo: mi obeanta restas.

OLIVERO

De li vi tre pretendis!

RENATO

Ĉu mi estis severa?

OLIVERO

Ne: kun li mi mem devis ofte esti fiera.
Sed bela la senzorgo je estonto fidanta!
Sed pura penso lia la vivon ne konanta!
Liaj okuloj nigraj havas da ĝojo denson,
Li sub hararo sia havas luman la penson,
Li estas brava, bela, fortika, malavara;
Lia koro lojala estas al mi tre kara.
Al mi li memorigas la tagojn de l'juneco.

RENATO *(al si mem)*

Li la morton aliras kun heroa braveco!

OLIVERO

Vi pensas?...

RENATO

Mi? Nenion!

OLIVERO

Mi estas nekredema!

RENATO

Mi volas,.... ke li venku....

OLIVERO

Ĉu vi estas ja ema

Lin je filin edzigi?

RENATO

Jes.

OLIVERO

Ŝi lerte ludadas,

Ĉar vi promesis ŝin al li, se li venkadas.

Kaj li, se li malvenkos, al vi donacos kion?

RENATO

Nenion!

OLIVERO

Hu! Nenion?

RENATO (*kvazaŭ al si mem parolante*)

Jes: mi volas nenion!

Tro maljusta kondiĉo!

OLIVERO

Ĉu vi volas, karulo,
Nuligi la kondiĉojn, se venkas la junulo?

RENATO (*kiel supre kaj pente*)

Li malgajnos! Mi petos je li, ke li nuligu
Honorparolon mian.

JOLANDO (*al Fernando*)

Vi ne parolas..... Igu
Vin ĝoja! Ĉu malŝatas vi la ŝakojn nobelajn?

FERNANDO

Mi? Mi rigardas viajn okulojn tute belajn....

JOLANDO

Senvunde nun mi vian ŝakaron neniigas:
Turon vi perdis; vian alferon mi mortigas,
Se vi ne metas ĝin en malproksiman flankon.
Atentu pri eraroj!

FERNANDO

Bela Jolando, dankon.
Multe mi pensis: restis mi nun neparolinta
Pro malĝoja certeco, ke mi estos perdinta.
Mi tute ne kapablas fari bonan movadon.

JOLANDO

Ĉu! vi volas, ke ŝanĝu ni inter ni ludadon?

FERNANDO

Ne! Tenu sorton vian kaj al mi lasu mian.

JOLANDO

Ĉu vi vidas, ke io okupas vojon vian?
Ho! mi sentaŭga! Vidu: multe mi eraradis:
Alferon ŝakumante, ĉevalon maltegadis!

FERNANDO (*forprenas ĉevalon*)

Ĝi ja ne estas venko, sed donaco ĝi estas.

JOLANDO

Feliĉa kaj de l' sorto favorita mi restas,
Ĉar vi tro senatente ludadas.

RENATO (*alproksimiĝas*)

Kiu gajnas?

FERNANDO

Mi malgajnas.

RENATO

Jes? Knabo, al mi tre bone ŝajnas,
Ke vi ĉesu tuj ludon: estis ŝerco la veto!

FERNANDO

Ne, pri afero tia ne decas la ŝerceto!

RENATO

Sed.... vi malvenkas....

FERNANDO

Volas mi favoron nenian,
Ĉar, se mi venkus, certe mi ŭzus rajton mian.

RENATO

Ha! ne tentu la sorton, paĝio.

FERNANDO

Mi ĝin tentas.

Ĉar, honorparolinte, mi poste ja ne pentas!

RENATO

Estu tiel!

(Li malproksimiĝas, sed poste li revenas)

Ne! Estas vi juna kaj kuraĝa:

Estus malvenko via je mi tro, tro domaĝa!

Aŭskultu vi, Fernando, mian saĝan konsilon:

Pri tio mi vin petas, kiel mi petus filon:

Vi konas sorton vian; nun, plu ne ŝakludadu.

Parolu vi, Jolando, por ke lin konvinkadu.

JOLANDO

Kial mi diros ion, kiun mi ne deziras!

Eble ludado lia de nun pli bone iras.

RENATO *(al Jolando)*

De glormeco vana vi nun estas logata.

JOLANDO *(leviĝas kolere)*

Ho!

RENATO

....Je malvenko, lia sort' estis destinata.

FERNANDO *(interrompante)*

Silentu, grafo: vane, tutvane vi parolas.

Ni ludos ĝis la fino!

RENATO

Agu kiel vi volas!

(Renato reiras ĉe Fombrono, kun kiu mallaŭte parolas. Jolando kaj Fernando iom da tempo senparole).

JOLANDO

Kion intencis diri dirante paĉjo mia:

« Se li malvenkos, estis destinata sort' lia »?

FERNANDO

Mi ne scias: vanaĵojn....

JOLANDO

Ne: saĝe li parolis

Kaj vi, ke li daŭrigu la diradon, ne volis.

Se vi malvenkos, kian vi faros malgajnaĵon?

FERNANDO

Ho! Ho! Bela Jolando, vere senvaloraĵon.

JOLANDO

Sed pacjo ol venkata vin preferas venkanta.

(al si mem)

Kial parcloj liaj igis min malĝojanta?

FERNANDO

Kuraĝe, Jolando bela! Mi estos malvenkanta.

JOLANDO

Kial vi restas ĉiam malĝoje pripensanta?

FERNANDO

Mi? Mi rigardas viajn okulojn tiel belajn.

JOLANDO

Vi estas tre malgaja: Ĉu dolorojn kruelajn
Al vi la vundo kaŭzas?

FERNANDO

Ne, ne, kara Jolando.
Estas bela la vivo.

JOLANDO

Ĉu estas via lando
Malproksime, junulo tre bona kaj afabla?

FERNANDO (*dolĉe*)

Jes: mi naskiĝis kie l'aer' estas agrabla,
Kie la tero havas multajn kaj belajn florojn,
Kie Muzoj favoras la poeziajn morojn.
En maro sin spegulas palaj olivarbetoj
Kaj montoj je fruktarboj riĉaj kaj je palmetoj,
De parfumo, de rido, de ĝojo estas ejo
Kaj ne ŝajnas, ke estas pli bela l' anĝelejo.
Senĉese blovas tie dolĉa venteto mara:
Sed ĉarma lando tia estas tre malnajbara!

JOLANDO (*malice*)

Fraŭlinoj loĝas tie agrablaj kaj amemaj....

FERNANDO

Jes, amemaj: sed ĉiam vantaj kaj forgesemaj.
La belulinoj, kiuj kreskis sub fajroj sunaj,
Jes, altiras la kisojn de multaj fraŭloj junaj.
Sed ni, kreskintaj meze de l' varmo kaj de l' floroj,
Ni, ĉirkaŭitaj ĉiam de vivecaj koloroj,
Ni amas la ĉielojn palajn, malvarmigantajn,
Blondhararo kaj bluan okulon ni tre amas:
Ofte pro ili niaj koroj kaj pensoj flamas,
Pli ol pro nigrokulo, ol pro bruna hararo....
Estas bluaj la montoj, kiuj lin ĉirkaŭigas:
La suno, subirante, ĉarme ilin origas.

(paŭzo)

Kaj vi estas beleta....

JOLANDO

Tre dolĉe vi parolas.

FERNANDO

Aŭskultu: ĉu vi kredas, ĉu vi kredas, ke oni
Povas morti, se oni amon ne povis koni?
Neniam ensentinte bategi sian koron,
Ne provinte de l' amo la ĝojon, la doloron?
Ne dirinte antaŭe la parolojn plej varmajn,
Ne revinte de l' amo ĉiujn la revojn ĉarmajn?

JOLANDO

Ne! Ne!

FERNANDO

Ne! Ĉu ne tiel? Eĉ unu horon solan
De l'ravo, kiu igas min blinda, senparola,
Mi je ĉiuj la ĝojoj de la mondo preferos.

(al si mem mallaŭte)

Post unu horo tia, mi la morton suferos.

(rigardante la kapon de Jolando)

Kiaj molecaj haroj!

JOLANDO

Vi parolas pri morto,
Kvazaŭ se vi plendadus pri via nuna sorto.

FERNANDO

Vi tre ĉarme ridetas....

JOLANDO

Kial, bela paĝio,
Malĝoje vi rigardas?

FERNANDO *(skuiĝas)*

Ho! Vero, pro nenio:
Mi pensis pri maleblaj esperoj kaj deziroj.
Ni ludu!

JOLANDO

Sed pri kio estis viaj sopiroj?

FERNANDO

Pri la paco, pri kampoj patrujaj malnajbaraj....

JOLANDO (*intence*)

Kaj de fraŭlinoj belaj pri rigardetoj karaj.

FERNANDO

Atentu: vi malvenkas.

JOLANDO

Vi ĝin al mi konigas
Tute zorge: la venko ŝajnas, ke vin timigas.

FERNANDO

Ĉu vi ne konas, eta adorinda Jolando,
Ke ludas sian vivon la paĝio Fernando?
Ke vi estas el ĉiuj knabinoj la plej bela,
Ke min tutĉarmis via nobla vizaĝ' anĝela?
Ke min ĉarmis de viaj haroj la mola blondo,
Ke tutsola, tutsola mi estas en la mondo?
Ke, se vi ne dirados unu aman parolon,
Mi suferos eterne malĝojon, malkonsolon?

JOLANDO

Kaj vi ĉu vi ne vidas, ke mi celas, ho! blinda,
Havi la ĝojon, kiu estas ĝojo plej inda?

OLIVERO (*al Renato*)

Estu certa: ne venkos li la belan knabinon.

RENATO (*laŭte*)

Kiel iras ludado?

FERNANDO (*ridete*)

Mi ŝakumas reĝinon!

JOLANDO

Aŭskultu! Nun unue mi aŭdas voĉon aman,
 Sed ofte songis vian viran okulon fiaman.
 Ofte sur la teraso, sidiĝinte vespere,
 Anstataŭ ol la preĝon, mi murmuris mizere
 Vortojn varmajn por peti la povegantian Dion,
 Ke Li al nokto mia donu novan radion!
 Malantaŭe je tiuj fenestregoj, la tagoj
 Pasadis malrapide, sen novaĵoj, sen agoj.
 Mi, vidante virinon portantan suĉinfanon,
 Rigardis vestojn miajn, la ringkovritan manon,
 Kaj min ol servistinon pli malriĉa ŝatadis.
 Dume sekreta timo tutan koron prenadis.
 Venis por jeedziĝi moŝtoj markizaj, grafaj,
 Sed mi rifuzis ĉiujn: ili restis sentrafaj,
 Sed fine vi, Fernando, bela kaj forta venis:
 Ke estos edzo mia la koro tuj divenis.

FERNANDO

Mi petos tuj edziĝi je vi, kara Jolando.
 Ĉu vi malŝatas sorton de paĝio Fernando?

JOLANDO

Kunigas nin Fortuno pro saĝegeco sia.
 Rigardu: nur du movoj kaj la venk' estos via.

RENATO (*proksimiĝas*)

Kiel iras ludado?

JOLANDO (*ridete*)

Filino nevenkifa

Meritos malhonoron resti superegita.

RENATO

Vi malvenkas?...

JOLANDO

Ne: baldaŭ....

RENATO

Kondiĉon frenezegan

Mi proponis, Fernando! Prenu la plej fortegan
El kastelegoj miaj: sed, je granda favoro,
Forgesu veton nian faritan je l' honoro!

FERNANDO

Ke mi amas fraŭlinon mi respondados sole;
Kaj vi, grafo, parolis al mi honorparole.

RENATO

Mi plenumos promeson. Sed, se vi havas koron,
Se vi amas filinon, se vi ŝatas honoron,
Pensu (kaj, se mi tion memorigas, pardonon!)
Pensu, ke ŝi rifuzis de grandduko la kronon.
El idar' antikvega al mi ŝi nure restas:
Je ŝi tre multaj princoj deziregemaj estas.

(Fernando ŝanceliĝas: Jolando lin incitas, per gestoj, ludi).

JOLANDO

Ludu, Fernando.

RENATO

Jam vi ankaŭ, juna viro,

Estos estimegata, tre pova kavaliro.
Sed, ĝis nun....

JOLANDO (*mallaŭte*)

Ludu lastan la movon!

RENATO

Sed, ĝis nune,

Vi vivas vivon vian tro senzorge, tro june.
Pripensu, ke Jolando, fraŭlino bela, riĉa,
Kun vi longe ne povus esti tute feliĉa.

(*Jolando kaŝe prenas manon de Fernando kaj movigas ŝakon*).

JOLANDO

Tutvane vi parolas: de l' ludo la plenumo!
Kaj restas veto via.

RENATO

Kial?

JOLANDO (*leviĝas kun ĉiuj*)

Makta ŝakumo!

OLIVERO

Li estis de Diablo aŭ de Amo helpata.

JOLANDO (*al Renato*)

De ni du edzon mian jam estis elektata.

RENATO

Ĉu vi montriĝas tiel malplena da tristeco?

JOLANDO

Hejmaniĝas venkanto: ne estas malvenkeco!

RENATO (*al Fernando*)

Malkonata, malhela estante nomo via,
Ĉu ŝajnas al vi luma sufiĉe nomo mia?

FERNANDO

Sinjoro,...

RENATO

Vi valoras je faro; je konsilo:
Kaj mi dankegas Dion, ke estas al mi filo.

FERNANDO

(*genufleksiĝas ĉe la piedoj de Renato kaj rigardas Jolandon*)

JOLANDO

Kial vi turnas ĉiam mute rigardojn helajn?

FERNANDO (*leviĝas*)

Mi? Mi rigardas viajn okulojn tute belajn....

★ ★ ★